# TEJO-aktuale: numero 108, 2003-04-14

---

T E J O - A K T U A L E N-ro 108 (14 Aprilo 2003)

---

Senpaga informletero de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
<http://www.tejo.org>;

---

1. INTERNACIA JUNULARA KONGRESO EN SVEDIO: LASTAJ NOVAĴOJ
2. UEA.ORG RENOVIGITA
3. INTERNACIA PLASTIKA KONKURSO

---

## 1. INTERNACIA JUNULARA KONGRESO EN SVEDIO: LASTAJ NOVAĴOJ

Lesjofors (Svedio), de la 19a ŝis la 26a de Julio: Internacia Junulara Kongreso (IJK) <http://www.tejo.org/ijk>;. La vespera programo inkluzivos koncertojn de Ĵomart kaj Nataŝa kaj de la rok-bando Dolĉamar.
Por ne havi malrabaton, nepre aliĝu antaŭ la 1a de majo!
Radio Varsovio intervjuis la IJK-kunordiganton David-Emil Wickstroem: la intervjuo aŭskulteblas ĉe <http://start.at/retradio>;.

---

## 2. UEA.ORG RENOVIGITA

La retpaĝaro de Universala Esperanto-Asocio (UEA) havas modernigitan aspekton kaj aktualigitan enhavon. Ĝuu ĝin ĉe <http://www.uea.org>;!

---

## 3. INTERNACIA PLASTIKA KONKURSO

La Internacia Asocio de Kristanaj Gejunuloj (YMCA), okaze de sia 80-jariĝo en Pollando, organizas internacian plastikan konkurson por infanoj kaj gejunuloj. Por informoj en esperanto skribu al <Dorota_szcz@interia.pl>.

---

TEJO-AKTUALE - Senpaga informletero de TEJO

La ideo: <http://www.esperanto.org/tejo/publikaĵoj/aktuale/koncepto.html>;.
La arĥivo: <http://www.tejo.org/tejo-aktuale>;.
Por aboni sendu mesaĝon al <majordomo@esperanto.org> kun la enhavo:
subscribe tejo-aktuale
Informojn kaj komentojn sendu al <tejo-aktuale-red@esperanto.org>.
La teamo de TEJO-aktuale estas:
Oleg Izjumenko, Jevgenij Gau s, Giuseppe Castelli.
Tiun ĉi numeron redaktis Giuseppe Castelli.

Ĉe abonu.com pri TEJO-AKTUALE zorgas Sl. Ivanov.